

VEK-KANTO

(Kanto el Somera E-Tendaro en Lančov, Ĉeĥio)

Vekiĝu ho, dormantoj, jam vokas la kukol',
vekiĝu ho, dormantoj, jam vokas la kukol',
vekiĝu, vekigiĝu, jam vokas la kukol',
ku-ku, ku-ku, ku-ku, ku-ku.

MATENA KANTO

(Kanto el Somera E-Tendaro en Lančov, Ĉeĥio)

De norda neĝo-region'
ĝis varma suda sablo-land'
niaj salutoj flugu vent-rapide,
tondre nun sonu nia ĝoja kant'.

VESPERA KANTO

(Kanto el Somera E-Tendaro en Lančov, Ĉeĥio)

Per mola paŝo venas,
la nokto trans montara pont'.
La dormo zorgojn prenas,
nin gvidas al song-rava mond'.

LUL-KANTO

(Aŭtoro nekonata)

Dormu dolĉe, knabineto,
dormu mia kor-trezor'
dum la dormo ĉiuj zorgoj
kaj suferoj estas for.

KUKOLO

(ĉeĥa popola, trad. J. Cink)

Dezirante trinki haltis mi
de fonteto ĉe rand',
jen aŭdigis el arbara fon'
de kukolo la kant':

Ho-la-la, hola-tiria, hola-kuku...

Diru al mi, kara kukolet',
kial kaŝas vi vin.

Diru al mi, kie estas nun
mia kor-amatin'.

IRIS KNABINETO

(pola popola, trad. R. Dobrzynski)

Knabineto arbareton iris kun la ĝoj'
iris kun la ĝoj', iris kun la ĝoj',
kaj renkontis ĉasisteton sur la sama voj'
sur la sama voj', sur la sama voj'.

La-la-la...

Ĉasisteto, samvojano, mi salutas vin,
mi salutas vin, mi salutas vin,
Vi ricevus buterpanon, sed mi manĝis ĝin,
sed mi manĝis ĝin, sed mi manĝis ĝin.

La-la-la...

MARIŜA

(Slovaka popola, trad. L. Kyselý)

**Ĉiuj knaboj kaj knabinoj amas sin,
nur neniun junuleton amas min.**

*Ref.: Mariŝa, kisu min, sen peto al patrin',
ŝi juna same faris, pri kisoj ne avaris.*

**Batas panjo, batas panjo, batas min,
ke mi amas, ke mi kisas knabo, vin.**

**Sidas panjo, sidas panjo sur kortet',
kaj mi estas en kamero kun knabet'.**

FLUAS AKVO

(Slovaka popola trad. L. Izák)

**Fluas akvo, fluas jen, tra sinjora flor-ĝarden',
tra sinjora flor-ĝarden'. Nja-na-na...**

**Anjo elverŝadas ĝin, Janĉjo alrigardas ŝin,
Janĉjo alrigardas ŝin.**

**Ne rigardu vi al mi, elsitelu ĝin eĉ vi,
elsitelu ĝin eĉ vi.**

**Kial verŝi akvon for, estas via ĝi labor',
estas via ĝi labor'.**

Dormu, bebo, baj

(Ĉeĥa popola, trad. Mirek Malovec)

**Dormu, bebo, baj, baju okul-par',
Di-sinjoro kun vi dormos, la anĝeloj lulon zorgos
dormu, bebo, baj.**

**Dormu, bebo, baj, noktu okul-par',
post momento vi vekiĝos, panja kaĉo vin satigos,
dormu, bebo, baj.**

Diru al mi, diru

(Slovaka popola trad. L. Izák)

**Diru al mi, diru, verda junipero,
ĉu karulo venos al mi dum vespero.**

**Venos ja, li venos, nigra sur ĉevalo,
li alligos ĝin al abi' ĉe dom-alo.**

**Nia abieto, ĝi belkreskas vere
vintre kaj somere ĝi aspektas verde.**